# Informilo

MONATA REVUO DE FLANDRA ESPERANTO-LIGO
MAANDBLAD VAN DE VLAAMSE ESPERANTOBOND

VERANTWOORDELIJKE UITGEVER:
RESPONDECA ELDONANTO: Jan Bovendeerd, Speeltuinlaan 14, B-2510 Mortsel

JARKOLEKTO
JAARGANG N° 5 JUN. 1984

ATENTINDAĴO

Nia "hejmo", la ESPERANTODOMO en Antverpeno, bezonas specialan prizorgadon ! Inter alie, la malantaŭa fasado devas ankoraŭ esti pritraktita kontraŭ la veter-varioj kaj pentre beligita.

Se la laboroj povos esti faritaj de volontuloj, ni povos ŝpari konsiderindan sumon.

Konsidere al niaj financaj eblecoj, la laboro do d e v o s esti faritaj de volontuloj !

Por eviti ke la entrepreno tro longe daŭru, la intenco estas fari ĝin dum la somer-feriado, do, ekde komence de julio.

Bonvolemuloj kiuj povos dediĉi iom da sia libera tempo kaj pretos helpi en la entrepreno estas - kun anticipa danko cetere - petataj kontaktiĝi kun S-ro Ivo DURWAEL, tel 03/440 30 92

Dankon.

daŭrigo en paĝo 7

I N F O R M I L O . Kadrogazeto de FLANDRA ESPERANTOLIGO
Frankrijklei 140, 2000 ANTWERPEN
Telefono 03/234 34 00

Jarabono : BF 150,- Kontoj : 402-5510531-55 kaj 000-0265338-43

---

| | | |
|---|---|---|
| Prezidanto : | Ivo DURWAEL, Paul Gilsonlaan 5<br>2520 EDEGEM | 03/440 30 92 |
| Sekretario : | Jan BOVENDEERD, Speeltuinlaan 14<br>2510 MORTSEL | 03/449 50 06 |
| Financoj : | Erik D'HONDT, Wilgstraat 25 A<br>9440 EREMBODEGEM | 053/77 44 97 |
| | Paul PEERAERTS, Baron Dhanislaan 13<br>2000 ANTWERPEN | |
| Informado : | Edward SYMOENS, Putsesteenweg 131 A<br>2180 KALMTHOUT | 03/666 62 66 |
| Intergrupa agado : | Hilde VAN INGELGEM, Arbeidstraat 21<br>9300 AALST | 053/70 50 11 |
| | Trees DOOMS, Baron Dhanislaan 13<br>2000 ANTWERPEN | |
| Junularo : | Kristin TYTGAT, St. Hathebrandstraat 8<br>2510 MORTSEL | 03/449 50 24 |
| Kadrokursoj : | André STAES, Jan Denucéstraat 1/198<br>2020 ANTWERPEN | |
| Literaturo/eldonoj | Christian DECLERCK, Amerikalei 135/2<br>2000 ANTWERPEN | |
| Gazetara servo : | Herman k. Annie DECEUNINCK-BOLLAERT<br>Lusthuizenlaan 1 b. 4, 1500 HALLE | 02/360 17 22 |
| Sciencoj : | Wim DE SMET, Hertendreef 12<br>2180 KALMTHOUT | 03/666 99 49 |

Provincaj respondeculoj :

| | | |
|---|---|---|
| Brabanto : | M. Th. HENQUINEZ<br>Lipsestraat 166, 2991 TILDONK | 016/23 61 90 |
| Limburgo : | Guido SCHROEYERS<br>Helzoldstraat 113, 3558 HELCHTEREN | 011/53 64 10 |
| Okc. Flandrujo : | vakas | |

---



## P R O T O K O L O

pri la estrarkunsido de sabato 2-a de junio 1984 en Esperantodomo, Antverpeno.

---

Ĉeestas : Erik D'Hondt (ED), Ivo Durwael (ID), Paul Peeraerts (PP), Edward Symoens (ES), Ite Tytgat (IT), Rosette Van Herck (RVH) k. Jan Bovendeerd (JB)

Senkulpigon petis : Trees Dooms, Hilde Van Ingelgem.

Prezidas ID - Protokolas JB kaj PP

Komenco : 10.10 h.

### T A G O R D O

Ni pritraktu prioritate la libroservon kaj la kontrakto kun Inst. Hodler 68.

#### 1. LIBROSERVO

FLEJA redaktis Esperant_lingven la kontraktprojekton kiun ni pridiskutis en nia antaŭa jarkunsido.
La aĉetsumo estos konata nur post kompleta inventaro.

Rilate al la gajno, PP faris komparan kalkulon el kiu elmontriĝis ke en la plej favora kazo FEL havos ± 10 %an gajnon, dum en la plej malfavora kazo, FEL restos kun ± 6 %malgajno.

ID opinias ke eventuala malgajno devus esti konsiderata kiel investo en la junularo, kiu finfine estas nia estonto. Li proponas akcepti la proponon.
Post iom plia ideinterŝanĝo akceptiĝas la propono.

Rilate al la inventaro ni akceptu ke ankaŭ insignoj apartenas al ĝi. FEL fakte akceptu la tutan libroservon, inkluzive de la insignoj k.s., krom la propraj iniciatoj de FLEJA (ĉemizetoj k.s.)

Pri la nomo de la libroservo decidiĝas uzi, almenaŭ komence, kiel cetere ankaŭ okazis en la jarlibro de UEA : LIBROSERVO FEL/FLEJA.

#### 2. Lukontrakto Inst. Hodler/ FEL/ LVS (= LA VERDA STELO)

Surtabliĝas nova kontraktpropono ellaborita de PP kaj Bob Venhuizen (por LVS)
Ekzistas problemo : Ist. Hodler klarigas certajn terminojn alie ol FEL/LVS.
Ekz. el "onderhoud" Inst Hodler komprenas la tuton, do ankaŭ riparado k.s., dum laŭ belgaj normoj, tio signifas nur " purigado ".

PP voĉlegas la diferencajn proponatajn ŝanĝojn en formo de nova kontrakto. La ĉefaj ŝanĝoj koncernas la :

- lu-daŭron kaj nulig-eblecon ĉesavizan (art 2 FEL/ 3 LVS)
- adapto de certaj terminoj kiuj povus esti malsame interpretitaj (art 7 FEL/8 LVS) ekz. "schoonmaken" anstataŭ "onderhouden" ;"binnendeuren" anst. "deuren" aŭ

ankoraŭ "riparado de vitroj k r o m okaze de hazardo aŭ superforto" anst.
" e ĉ " okaze de ... "
+ por FEL : " la posedanto garantias la bonan funkciadon de la centra hejtado"

- rilate al la luprezo (art 11 FEL/12 LVS) la baza indico estu tiu de decembro 1984 kun aldono por FEL :
" Se la domposedanto ne havas ŝuldojn al la luanto, la luprezo estos pagita ... "

En la diskuto kiu sekvas ID eliras de la vidpunkto ke la plej forta cedu, dum la plej malforta ricevu. Estas tri partioj: Inst. Hodler, FEL kaj LVS el kiuj tri la plej forta nun estas LVS, poste Inst. Hodler kaj fine FEL. ID opinias ke LVS lojale pagu la lu-plialtigon, dum estu trovita por FEL pli favora sistemo, ĉar FEL plej multe suferas.

Hans Bakker proponis fari novan kontrakton kaj proponi novan lu-prezon. Do, proponi ?

Kiel ajn estu, ni ne retroiru, ĉar leĝe la posedanto devas antaŭe sciigi intenc-itan plialtigon. Li ne faris tion, do, ni ne akceptu krompagon por la jaroj 1981, 1982 kaj 1983. Ni povus akcepti ekde majo 1984. Alivorte, ni alprenu novan starton kaj silentu pri la pasinteco.

La proponita luprezo estas BF 20.000,- kaj la plialtigojn estu kalkulitaj jene :

$$\frac{\text{baza prezo X nova indeksindico}}{\text{antaŭa indeksindico}}$$

Kiel procedi ?

Ni proponos al Inst Hodler novan kontrakton "prenotan aŭ lasotan".

PP okupiĝas pri la sendado de la kontrakto.

3. La protokolo pri la estrarkunsido de 05 05 84 estas aprobita krom eratumo al la organigramo.
Rilate al punkto 1.2. ni povos mencii ka FEL efektive ricevis de Inst. Hodler subvencion de 800 gld por la eldono de la "Manlibro de la aktivulo"

4. INFORMADO

ES raportas ke je dimanĉo 27-a de majo BBC en sia programo "Sharing Time" elsen-dis teatraĵon "High Hopes" en kiu multe temis pri Esperanto. PP surbendigis la programon.

Ĉi tie JB devas forlasi la kunsidon. Plu-protokolos PP.



- Venontan jaron la luksemburga televido elsendos al 20-o da landoj.
Leviĝas la demando, ĉu proponi al ili elsendo(j)n en aŭ pri Esperanto.
ID sugestas, ke Herman Deceuninck informu ilin pri internaciaj Esperanto-aranĝoj kun la invito veni.

- La nova Eŭropa identeckarto estos nacilingva + anglolingva. ES proponas ke FEL protestu kontraŭ tio.
Akceptite. Krome ESPERANTO PANORAMA atentigu siajn legantojn pri tio.

- ES konsentas gvidi la kolokvon en la kongreso de Aalst. Li inter alie proponas science pristudi la reziston al Esperanto, la valoron de Esperanto en pluraj kampoj ktp. Decidiĝas kunveni speciale por priparoli la temaron. ES kontaktos la aliajn por fiksi daton. ED ne partoprenos, sed JB tamen sendu al li porinforme la materialon.

- PP klarigas, ke momente FEL havas 513 membrojn, kompare al 465 pasintjare je la fino de majo. Tio ĉi aperu en ESPERANTO PANORAMA.

- El letero de"Paco kaj Justeco" evidentiĝas ke la edzinoj de la membroj de tiu grupo ekde tiu ĉi jaro ne plu volas esti membro de FEL.

- PP liveru detalojn pri la salajraj elspezoj.

- ED kaj ID ree emfazas ke la estraranoj prefere ne uzu oficistojn por eviti kostojn.

- La lifto ne plu rajtas esti uzata, ĉar ĝi ne estas konforma al la leĝo. Kostoj por Inst. Hodler povus esti ĉ. BF 500.000,-. Verŝajne la domposedanto ne volos ripari. Ĉar ĝis nun ne estas klare, kiu respondecas en okazo de akcidento, la estraro proponas fermi la lifton dum ĉiuj kunsidoj kaj uzi ĝin nur ekster tiuj por transporti varojn.

5. MONATO

PP klarigas la nunan situacion de la revuo. Se la Grafika Centro plu-eldonos la revuon, oni petos al FEL esti peranto por la plimulto de la landoj. FEL ricevos 10 %an maklerajon por tiu servo.

6. MANLIBRO

Inst. HODLER 68 asignis al ni subvencion de 800 gld, pagotan kiam la unuaj cent paĝoj estos pretaj. Estraranoj kiuj povas kunlabori estas petataj kon-takti PP.

7. LIBROSERVO

7.1. LIBROVERMETO

ED proponas eldoni revueton por libroamantoj : "Librovermeto". La unua

numero estos presita grandkvante kaj sendita kune kun ESPERANTO PANORAMA. Poste oni sendos ĝin nur al petintoj kaj al mendintoj de libroj.

7.2. PREZO-POLITIKO

Oni diskutas ekde nun apliki la jenan prez-politikon por libroj de la libroservo FEL/FLEJA :

- la katalogprezo egalu al la katalogprezo de UEA. Se ne estas konata la prezo de UEA, la katalogprezo estu la kostoprezo X 1,5.
- la prezo por FEL-membroj estu : $U - ( \frac{U - K}{3} )$ en kiu U estas la UEA-prezo kaj K la kostoprezo.
- la prezoj dum kongresoj (FLEJA-servo) estu ĉiam la katalogprezo.
- Ne-membroj povos membriĝi por havi la FEL-rabaton, sed ne devos.
- Aperos en niaj reklamoj frazon, kiu diras proksimume jenon :
  " Se vi povas aĉeti niajn librojn pli malmultekoste aliloke, avertu nin kaj ni repagos al vi la diferencon kun rideto."

JB k. PP

-------------------------



atentindaĵoj

ERATUMO

Bonvolu ŝanĝi en via organigramo en la rubriko " estraro de FLEJA " : (antaŭlasta paĝo)

Sekretario : Annemie SUYKENS
Teichmannstraat 6
2018 ANTWERPEN

kaj aldoni : Reprezentanto de FLEJA ĉe FEL : Kristin TYTGAT.

GRATULOJ

Antaŭ ne longe ni petis al la grupoj imiti ekzemplon de ESPERANTO MORTSEL sendante leteron al la Kultur-konsilantaro de sia komunumo kun la peto kunlabori en la kolokva temo, sed adaptita al la ĝenerala kulturo :
" Kiuj estas la psikoligiaj motivoj konvinkaj ..."

Laŭ nia scio, ESPERANTO HASSELT agis tiel kaj ricevis favoran eĥon. Nome, en la protokolo de la kunsido de 14 05 1984 de la Hasselta Kultur-konsilantaro ni legas :

" Schepen Van Lishout reageerde op het vorige verslag waarin ideeën en suggesties werden gevraagd n.a.v. 100 jaar Esperanto. Wij zullen deze, en eventueel nog volgende reacties aan de Esperanto-club overmaken. "

traduko "Skabeno Van Lishout reagis je la antaŭa protokolo en kiu ideoj kaj sugestoj estis petataj rilate al 100 jaroj da Esperanto. Ni transdonos tiujn, kaj eventualajn sekvontajn reagojn al la Esperanto-klubo."

Tio ĉi pruvas ke nia "afero" ne estas ĉiam negative prikonsiderata. Sufiĉas ke ni havu la ideon kaj la kuraĝon ion entrepreni.

Dankon kaj gratulojn al ESPERANTO HASSELT.

---------

Nia GAZETARA SERVO, sub gvidado de Herman kaj Annie Deceuninck-Bollaert nuntempe lanĉas kampanjon " 5000".
Temas pri la trovo de 5000 personojn, kiuj pretas lerni Esperanton senpage pere de nia mem-studa kurso ESPERANTO PROGRAMITA.

Por ke tiu ĉi kampanjo aperu en kiom eble plej da gazetoj kaj revuoj, Herman kaj Annie petas ke oni sciigu al ili ĉiujn eblajn adresojn de junularaj kaj fakaj revuoj kaj de gravaj liberaj radio-stacioj ekz. de universitataj kampusoj.

# RADIO-PROGRAMOJ EN ESPERANTO

Vi trovas ĉi-sube ĉiujn aktualajn indikojn laŭ la mezeŭropa tempo. Por eltrovi la ĝustan tempon en via regiono, konsultu la mapon de tempozonoj en la poŝkalendaro sur paĝo 4. Por havi nun la grenviĉan tempon, subtrahu unu horon. Se ne estas aliaj indikoj, la frekvencoj estas en kilohercoj kaj la ondolongoj en metroj. Plejparte temas pri kurtondaj frekvencoj.

| stacio | tago | horo | frekvencoj | metroj |
|---|---|---|---|---|
| Varsovio (Radio Polonia) | ĉiutage | 6.30- 7.00 | 6135, 5995, 7270, 3955, 1503 | 48,90; 50,04, 41,27; |
| Esperanto Redakcio | | | | 75,85; 200,00 |
| Poŝtkesto 46 | | 12.00-12.30 | 9525, 7145 | 31,50; 41,99; |
| PL-00950 WARSZAWA 1 | | 17.30-18.00 | 7285, 6095 | 41,18; 49,22 |
| | | 20.30-21.00 | 7285, 6095 | 41,18; 49,22 |
| | | 22.30-23.00 | 7285, 6095 | 41,18; 49,22 |
| | | | 5995, 3955, 1503 | 50.04; 75,85; 200,00; |
| Bern (Svisa Radio Internacia) | lunde | | 9535, 6165, 3985 | 31,46; 48,68; 75,28 |
| Esperantofako | jaŭde | | | |
| CH-3000 BERN 15 | sabate | 19.00-19.10 | | |
| | | 21.30-21.40 | | |
| Vieno (Aŭstra Radio) | dimanĉe | 6.45- 6.57 | nov'82-maj'83: | |
| ORF Esperantoredakcio | | | 6155, 5945, 17745 | 48,74; 50,46; 16, |
| Poŝtfako 700 | dimanĉe | 10.45-10.57 | 6155, 7170, 9770 | 48,74; 41,48; 30,71 |
| A-1041 WIEN | vendrede | 17.55-18.00 | 89,8 MHz en MF | (UKW) nur loke aŭdebla |
| Vatikano (Radio Vatikana) | | | 1a Eŭropa Programo | |
| Esperantoredakcio | dimanĉe | 21.05-21.15 | 6190, 6210, 7250, 9645, 1530 | 48,47; 48,30; 41,38; 31,10; 196 |
| I-00120 | | | Afrika Programo | |
| CITTÀ DEL VATICANO | | | 9625, 11700, 15120 | 31,17; 25,64; 19,84 |
| | jaŭde | 7.10- 7.30 | 2a Eŭropa Programo | |
| | | | 6210, 7250, 9625, 11715, | 48,30; 41,38; 31,17; |
| | | | 11740, 15120 | 25,61; 25,55; 19,84 |
| Romo (Radio Roma RAI) | | | tutjara: 7275 | 41,24 |
| Esperantoredakcio | sabate | 21.00-21.20 | mar-okt: 9710, 11800 | 30,90; 25,42 |
| C.P. 320, I-00100 ROMA | | | nov-feb: 7290, 9575 | 41,15; 31,33 |
| Zagrebo (Radio Zagreb) | marde | 23.45-24.00 | 1134, 1143 | 264,70; 262,00; |
| Esperantoredakcio | | | | |
| Jurišićeva 4, | | | | |
| YU-41000 ZAGREB | | | | |
| Sabadell (Radio EAJ-20) | merkrede | 22.30-22.45 | 882 | 340,1 |
| Esperantoredakcio | | | 90,9 MHz | en MF (KW) |
| C. Convento 22 y 24 | | | | |
| SABADELL, Hispanio | | | | |
| Pekino (Radio Pekino) | ĉiutage | 21.00-21.30 | 9965, 9365, 7470 | 30,10; 32,00; 40,10 |
| Esperantofako | | por Eŭropo | | |
| BEIJING | | 23.30-24.00 | 11515, 9860 | 26,06; 30,40 |
| | | por Latin Ameriko | | |
| | | 12.00-12.30 | 7315, 9860 | 40,10; 30,42 |
| | | por Japanio kaj Koreio | | |
| | | 14.00-14.30 | 15165, 11685 | 19,78; 25,60 |
| | | por Sudorienta Azio | | |
| Valencio | sabate | 21.30-21.45 | 1314 | 228,3 |
| (Radio La Voz de Valencia) | | | 96,9 MHz | en MF (UK |
| Esperantofako | | | | |
| Av. del Cid 154 | | | | |
| VALENCIA-14, Hispanio | | | | |
| Rio de Janeiro | lunde | 0.00- 0.15 | 1400 | 214 |
| (Brazila Spiritisma Federacio) | | | | |
| av. Passos 30 | | | | |
| BR-20000 RIO DE JANEIRO ZC 58 | | | | |
| Brazilo | | | | |
| Sorocaba | lunde | 1.00- 2.00 | 1080 | 278 |
| (Rádio Clube de Sorocaba) | | | | |
| Esperanto-Redakcio | | | | |
| rua de Penha 455 | | | | |
| BR-18100 SOROCABA SP | | | | |
| Brazilo | | | | |
| Liberecana Radio Parizo | vendrede | 20.00-21.00 | 89,6 MHz | en MF (UKW) |
| 145, rue Amelot | | | | |
| F-75011 PARIS, Francio | | | | |